

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCAREDAKTANTOJ PROF. DR. OD BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZYAPERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

S. O. S.!

Oni ne povas sen vera kontento legi artikolon en januara numero de P. E. pri invado de 500 vikingoj al Polujo. Tio estas tute ebla, se ni, poloj, nur centope invadis Stockholmon, do ili revizitos nin pli multnombre. Sed vere tre ĝustatempe ni devas alarme sonorigi en nia lando, kiel tion faras samideano H. Gielb, por inde povi akcepti niajn gastojn. Al instigoj de la artikolo mi nenion novan volas aldoni, mi pensas, ke ili per ĝusta eho resonas en koroj kaj menscj de ĉiuj veraj polaj esperantistoj kaj revekos ĉiian aktivecon. Sed... ni diru al ni la veron, ke ni tre sincere volas fari multon, dum ni estas legantaj tiajn artikolojn, sed ĉia nia bona volo tuj estas for kiam ni metis P. E. en ŝrankon. Ni estas pretaj aprobe legi similajn artikolojn, iafaje esprimi sian aprobon en parola aŭ skriba formo, sed la afero kiel statis tiel statas ĝis nun. Se estus alie, tiam ni legus pri sekvoj, pri faro de koncernaj paŝoj. Sed kion ni legas en P. E. Frarigardu ĉiujn numerojn de P. E. en 1935 j. kaj vi vidos, ke dum la tuta jaro aperis ne pli ol 9 seriozaj artikoloj koncernantaj nian movadon aŭ enhavantaj instigojn kaj konsilojn.

Kie do estas la rezultoj? Oni povus pensi, ke tiuj bonvolaj konsciaj esperantistoj, kiuj cerbumas pri savo de nia verda ŝipo el ondoj de krizo, povas esperi, ke ili estos komprenitaj kaj subtenitaj, ke iliaj instigoj kaj konsiloj ne estos va-

naj. Sed evidente estas alie. Ĉar, ekzemple, mi kelkfoje skribis en P. E. artikolojn, kaj eĉ poste trovis en ĝi favorajn menciojn, sed kiam mi persone faris mem unuan tiurilatan paŝon — mi akiris preskaŭ nenan subtenon. Mi faris aliajn provojn samrezulte. Do, ĝesamideanoj, ni diru al ni kuraĝe la veron. Se devas resti tiel, kiel ĝis nun — tiam prefere ni revoku Varsovia kongreson. Se ni ne estas en eblostato eĉ doni el ni por nia esperanto-movado almenaŭ tiom, ke Adresaro de Polaj Esperantistoj povu esti eldonata en malpleje 3 monataj tempodistancoj, ni tiaokaze ne esperu starigi por la kongreso almenaŭ kvincentpersonan verdan armeon.

Kaj ni devas al ni klare diri, kio estas ties kaŭzo. Certe estas, ke ne nur la krizo — ĝin estas plej facile kulpigi — sed ankaŭ ni mem. Ĉar ni traktas Esperanton troe kiel malgravan akcesorajon, ĉar ni hontas portadi ĉiam steletojn, kaj alimaniere demonstri kuraĝe nian esperantismon, ni timas ridetojn kaj interparoladojn pri ĝi. Kaj tial oni ne miru, ke oni ne multe taksas en nia lando tion, kion ni kvazaŭ kaŝas kontraŭ aliaj, per kio ni mem kvazaŭ prezentas nin kiel homojn, okupigantajn pri esperanto, kiel ne pri seriozajo, sed pri ludaĵo.

Kaj se ni ne ekskuos nin sufiĉe forte por vekti nian endormiĝeman esperantismon, tiam ni ne kuraĝu montri ĝin al internacia kongreso en Varsovio.

Sed se vi volas konvene aranĝi la kongreson — vi ne rajtas ĉiun laboron lasi nur sur ŝultrojn de P. E. D. de nia alrespektinda s-ro Profesoro kaj de liaj plej proksimaj kunlaborantoj. La Kongreso okazos en Varŝavo, do tien ni devas koncentrigi ĉiujn klopodojn. Verdire kaj bedaŭrinde nia ĉefurbo ne posedas konvenan por si rolon en nia esperantomovado, kvankam ĝi estas sidejo de niaj gravaj naciaj esp.-organizoj kaj eĉ havas konvenajn homojn, sed mankas al ĝi iniciateco kaj spirito. Kaj ĝi devus ludi gvidan rolon inde reprezentante nian movadon ĉe aŭtoritatoj. Ekmemoru, kiom da subskriboj estis kolektitaj, kiam temis pri nomigo de Zamenhofa-strato; — kie pereis do tiuj fortoj.

Bonvolaj kaj seriozaj konsciaj gesami-

deanoj! Ekstaru fronte al Varŝavio! Tempo urgas! Hannibal ante portas! Ankorau restas jaro! Ĉu ni kompromitigu ĉe nia jubileo? Venku miskomprenon kaj anstaujuĝon, regantajn en nia socio! P. E. D. plej baldaŭ kunvoku landan kongreson. Preparu por ĝi jam nun materialon, proponojn, instigojn, rezoluciojn, streĉu vian iniciaton al serĉo de rimedoj por venki nian esperantan krizon. P. E. D. anoncu en pola gazetaro publikan alvokon al socio kaj aŭtoritatoj por ĝustadirekte agordi ilin. Neniu forreslu de tiu ĉi laboro.

Mi esperas, ke mia alvoko ne estos vana. Ni insurekcie akiru konvenan pozicion en internacia esperanto-movado.

Inĝ. M. Chmieliński
Łódź.

LA LIMOJ DE NIA PROPAGANDO.

(kun afabla peto al s-o Salo Grenkamp en Parizo pri respondo)

La kuranta epoko de kompleta kaj ĝenerala stagno sur preskaŭ ĉiuj kampoj de la kultura vivo socia tre favoras la pri-rigardon de la fenomenoj de ne tro ankoraŭ malnova periodo, kiam ĉio aperis alifirme, kiam ankoraŭ regis tre vigla vivo societa, kiam estis aranĝataj kursoj de Esperanta lingvo, oni kantis, ludis, incitadis sin reciproke, kiam oni parolis pri „grandaj sukcesoj“ kiam la verda tono de la ĉielarko estis speciale larĝa, eĉ tiel larĝa, ke ĝi preskaŭ sufokadis altajn kolorojn.

Dekojn da milionoj da homoj posedas ĉiu nacio; nia pola 32 milionojn. Oni revis pri esperantigo de tiuj ĉi milionoj, kvankam en plej favoraj cirkonstancoj nur por la parteto da ili estus necesa esperanto. Sed oni ne pensis pri tiu ĉi parteto. Oni rezonadis laŭskeme: lingvo estas inter-n a c i a, sekve ĉiuj n a c i o j devas esti ekposeditaj por ĝi, kaj la vojon por tiu ĉi celo oni vidis en la... gvidado de la kursoj kun maksimume kelkdek personoj, el kiuj nur parteto ilin finis kun pli-malpli bona ekposedo de la lingvo. Oni enkapigis, oni perforte encerbigadis al la kursanoj por ilin konsoli, ke la lingvo estas tiel facila, ke oni preskaŭ ne bezonas ĝin lerni, kio ne estas vera, se oni volas la lingvon plene have ekposedi. Se la homoj ĝin ekposedis, ili ne ĉiam bone sciis, kion fari kun tiu ĉi nova scio.

Estis ĉiupaŝe iluzioj en tiu ĉi agado. Oni ilin ne vidis, oni ilin ne volis vidi,

ĉar nia movado havis unu specialan trajton, kiun laŭ mia scio, ankoraŭ neniu formulis: pensante pri estonteco, ĝi sente vivas en estanteco. Tiu ĉi estanteco realiĝanta en tiel nomataj „grandaj sukcesoj“ (t. e. akiro de ia malgranda kvanto da novaj adeptoj kun samtempa perdo de malnovaj, pri kiuj oni jam ĉesis pensi) kovradis antaŭ niaj okuloj la malproksimajn celojn kaj samtempe grandajn kaj lastajn: esperantigon de la tutaj n a c i o j. Tiel la lingvo principe kaj laŭcele“ inter-n a c i a fariĝadis praktike lingvo inter-s o c i e t a.

Tiu ĉi feliĉa en siaj sekvoj iluzio, ke per simplaj kursoj de kelkdekaj personoj oni povas esperantigi la tutajn milionojn, el kiuj konsistas la nacioj, permesis ne vidi la vastan, kiel dezerta ebenaĵo, kampoj de tio ĉi, kion oni devis prisemi per niaj esperant-ercj. Feliĉa iluzio! Certe: f e l i ĉ a, ĉar se oni vidas la realecon, oni eĉ tion ĉi eble ne estus farintaj, kion oni ĝin nun faris. oni ektimus tre grandan kaj tro vastan spacon de la prise-mota kampo. Inaĝu la terkulturiston, kiu devas prisemi sian teron. Subite oni montris al li tutajn mejlojn da ebenaĵo kaj postulas de li ĝian prilaboron. Li kun ek-tremo konstatas, ke, se li dissemos la kvanton de la greno, per kiu li disponas, li perdis eĉ tion ĉi, kion li posedas, kaj per kio li povus prisemi nur malgrandan terparton. Do, kiel vi vidas, estas bone kelkfoje ne vidi la realecon.

Sed ni tion ĉi jam antaŭ jaroj vidis

kaj skribis pri ĝi en artikolo „minacas krizo!“ Nune komencas tion ĉi vidi ankaŭ aliaj personoj, ĉar nune pro la krizo ĉio lamas, sekve lamas ankaŭ nia propagando. Des pli precize do ni vidis tion, kio estis ĝis nun farita, nian ĝisnunan posedo-staton, simile kiel maljuna malfortulo, ne scipovanta jam (momente au daŭre) labori povas pli klare prikalkuli, kion li faris, ol tiu, kiu vivas per la esperoj, ke li faros ankoraŭ multon, multegon.

Kion do ni faris?

Certe multe! Sed ne temas pri la rilato de la faritaĵoj al nia energi-elspezoj. Oni povas ĝis trasangumo de la cerbo labori en kvar muroj de sia ĉambreto, sed se tion ne ensorbas la cerboj de aliaj personoj en la strato, tiu energielspezo fariĝas **nevidebla** kaj sekve senefika.

Tial mi volas pritrakti rilaton de nia energi-elspezo al tio, kio estas ankoraŭ farebla por ekposedi la milionojn. El tiu ĉi vidpunkto estas farita tre **malmulte**.

Se vi ne krelas, provu konstati mem: kion scias pri esperantismo la personoj, kun kiuj vi parolos pri ĝi unufoje?: ia akvokato, kuracisto, instruisto, laboristo, inĝeniero k. t. p.? Sed ne estu grave, kion ili diros pri la graveco de helpla lingvo **ĝenerale**, kaj pri ĝia estonta utileco, sed pri la informoj pri esperantismo! Preskaŭ nenion kaj preskaŭ ĉio falsa! Kiomfoje oni en la ĵurnaloj legas ion pri Esp., kio ne estas skribita de ni, tiomfoje tio estas simplaj sensecaĵoj. Imagu diskuton pri „Akordo Esp.“ en nia sejmio. Ĉu ni havas iluziojn, ke oni saĝe pri ĝi diskutos kaj voĉdonos pri ĝi? Tute nel! Certe estos simile, kiel antaŭ ne tro multe da jaroj en la bavara parlamento: sensecaĵoj! Kion scias pri Esp. en Germanujo ministro Goebels, kion diris pri ĝi Adolf Hitler? Ĉu tio ne provas, ke efektive granda propagando de niaj germanaj samideanoj eĉ ne atingis tiujn ĉi personojn? Ne estus alimaniere eĉ ni, se la diskuto eksplodis.

Ĉu principe estas preparita kaj Esp. povus jam de post la milito, se ne plifruge, esti instruala en la lernejoj kaj tamen ĉiam ĝis nun ĝi estas problemo de la nuba estonteco.

Kion do fari por esperantigi milionojn da homoj, el kiuj konsistas ĉiu nacio? Enkonduki en la lernejojn en unu lando sen la aliaj estas riska kaj luksa paŝo,

kiun certe kontraŭstarus la tuta nacio.

Enkonduki **samtepe en kelkaj ŝtatoj** postulus **Interŝtatan Esperanto-Akordon**. Sed por ke ĝi ne estu la postulo de areto da esperantistoj, oni devas kolekti la nomojn de ĝaj adeptoj. Sed ĉu oni provis tion ĉi fari? Tute nel! Oni tre ĝojis, se oni scipovis konvinki ĵun pri esperantismo, oni ankoraŭ pli multe ĝojis, se oni instruis al li la lingvon. Sed oni lasis lin izole. Bone estis, se li eniris la organizitan societon. Oni opiniis naive, ke ju pli da personoj estos en la societo, des pli proksima estos „fina venko“. Pro tio, ke ne ĉiuj personoj volis resti en la organizitaĵo esp., sed vivis ekster ĝi, sekve oni opiniis, ke oni devas kolekti la nomojn kaj adresojn de tiuj personoj. Bona ideo, sed ĝi ne proksimigas „la finan venkon“.

Sed kompreneble tiu ŝtato de la societaj kursoj kvarkam estis necesa, estis nur preparata periodo por sistema instruado en la lernejoj. Akirante novajn adeptojn por la ideo kaj tiom pu por lingvo Esp., oni devis ilin antaŭ ĉio akiri por ideo de Interŝtata Esperanto-Akordo, sekve preni de ili deklaron skriban pri tiu ĉi ideo. Imagu nun, ke dum multaj jaroj de nia ĝisnuna propagando oni tuj de la komenco kolektus tiajn nomojn, precipe inter la homoj gloraj kaj bone konataj! Se eĉ tiuj homoj estus mortintaj, tamen ilia skriba deziro restus kaj influus la personojn vivantajn. Ensume tiu ĉi subskribo formus grandan voĉon de postulantoj kaj la homoj, kiuj estus aŭdintaj pri esp. unufoje, aŭdus samtempe pri nia volo. Kiel multe pli facile estus organizi tiun ĉi fiordon de la postulantoj, ne nur el la esperantistoj, sekve el la personoj, konantaj la lingvon Esp., sed ankaŭ el la adeptoj le ĝi, kiuj ne bezonas ĝin koni. La armeo estus pli facile organizebla ol nur pure el la lingvo-konantoj, kion ankaŭ oni forĝesis fari.^{*)} Tiel agante, ni prezentus ian forton rilate al neesperantistoj. Nune ni estas seninflujaj, „voko sur la dezerto“.

Kion do fari? **Komenci!** Sed antaŭ ĉio veki esperantistojn en diversaj landoj. Fari la saman, kion faris Karlo Marx en socialista movado („proletoj de ĉiuj landoj unuigu vin!“): „esperantistoj kaj adeptoj de esperanto organizu vin kaj ekpostulu de viaj ŝtatoj la Interŝtatan Esperanto-Akordon!“ Sed esperantistoj tion ĉi ne postulas. Ili ne scias, kion fari, Ili tra-vivas siajn iluziojn kaj miras, ke ili restas ĉiam sur la sama loko.

Ekonomiĉi povus grandaj kaj gravaj revuoj de nia movado, ekz. „Nia Gazeto“ de Salo Grenkamp, pli ofte aperantaj ol aliaj. Se ili dissendus la alvokon al naciaj centroj de Esp. movado en diversaj landoj, eble oni povus kolekti ian kvanton da samideanoj, kiuj ekkomencus nun populargiron de la ideo pri la plebiscito por Interŝtata Esp. Akordo inter la esperantistoj (kiuj ĝis nun dormas) kaj due: kolekton de la subskribej. Kion o-

pin'as nia estimata redaktoro, S. Grenkamp?

Kun salutoj al li

dro Antoni Czubyński.

Ostrowiec Kielecki, Sienkiewicza 53, m. 8.

*) Oni ne ĉiam bezonas ĝisfunde ekkoni ian problemon por protekti iun aferon. Se mi ekz. protektus kontraŭalkoholismon, ĉu mi por tio ĉi nepre bezonas traduti medicinajn librojn pri la malbonaj sekvoj de alkoholismo? Certe ne!

KRITIKO DE KRITIKO.

La esperantaj gazetoj estas plenaj de diversaj artikoloj pri la krizo en nia movado. La aŭtoroj de tiuj ĉi artikoloj streĉas siajn fortojn por indiki la plej ĝustan vojon, direktantan al la venko de la esperantisma ideo.

Miaopinie ĉiuj proponoj estas bonaj kaj aplikeblaj, oni ne devas nur forgesi, ke proponoj mem ne sufiĉos. La proponantoj devas realigi siajn projektojn.

Kritiko, indikoj aŭ rimarkigoj estos deziregataj kaj komprenataj, kiam oni vidas pulsantan, vivplenan laboron. Nur en tia kazo kritiko (estas) povas esti efika — inverse. — Ĝi estas kiel voĉo vokanta en dezerto.

Ni, esperantistoj, devas konsciigi, ke la esperantismo estas ankoraŭ en stadio, postulanta aktivan, senĉesan kaj sindonan laboron de la tuta esperantistaro, precipe, de tiuj samideanoj, reprezentantaj nin dum esperantaj kongresoj. Mi pensas pri niaj delegitoj, ĉefe pri tiuj, kiuj ĉagreniĝas pro la malbona stato de nia movado — Ne ĉagreniĝu, samideanoj, ne verŝu larmegojn, skribante viajn grandajn, senesperejn artikolojn, senvolontigantajn multe da freŝe bakitaj esperantistoj de la laboro sur la esperanta kampo.

Anstataŭ malĝojigi kaj veneni la esperantan atmosferon alpaŝu al konkreta laboro: organizu esperantajn rondojn tie, kie ili ne estas, organizu la neorganizitajn esperantistojn, poste, estu certaj, ke la ŝtato de nia movado tuj pliboniĝos.

En nia urbo neniam estis esperantista rondo. Kiam mi proponis al kelkaj ĉielokaj kluboj aranĝi esperantan rondon, ĉiam mi estis ricevanta negativan respondon. Sed fine unu el la ĉi tieaj sportkluboj akceptis mian proponon. Nun ni havas esperantistan rondon kaj kurson de la esp. lingvo en tiu ĉi rondo, kiun vizitas

regule 45 ĝelernantaj. Nia rondo kreskas kaj disvolviĝas.

Estas multaj urboj kaj urbejoj, kie la esperanta movado aŭ mortos, aŭ entute ne komencis vivi, malgraŭ tio, ke en tiuj urboj loĝas esperantistoj, abonantaj esperantaj gazetojn. Ili pensas, ke per legado de esperantajj oni povas venigi mesion.

Ĉiu esperantisto devos, krom memlernado, allogi al nia movado sian konaton kaj aranĝi, se ne estas ĝis nun aranĝitaj, esperantaj rondojn. La esperantistaj centroj devos siaflanke dissendi propagandajojn kaj alvokojn al ĉiuj esperantistoj en diversaj urboj kaj urbejoj, kie esperantis'aj rondoj ne ekzistas.

Tia laboro revivigos ankaŭ, grandgrade, la centrojn esperantaj kaj kreos ĝermojn de novaj esperantaj fokuso.

Suvalkano.

VINTRO.

Hilda Dresen.

Kian belecon la vintro enhavas!
Haltu, rigardu! Okulojn ekkravas
Kampoj ebenaj,
Blankaj, neĝplenaj.

Kia loganta vastec' senmezura!
Kaj super ĉio ĉielo lazura,
Frosta sunbrilo,
Muta trankvilo.

Kaj nia norda arbar' konifera,
Tiel pensema, fiere severa,
Neĝornamita,
Pie medita.

Vintro, ho, via beleco majesta
Estas ja por la nordano modesta
Kvazaŭ mistero,
Sorĉa fabelo!

HIERONIM DEROOWSKI.

De moŝt Ĉorlinski al Puck pro retoj vojaĝo.*)

Introdukcio.

He, frataro! Pli atente streĉu la orelojn,
Ĉar mi volas tromprakonti ja nebagatelojn!
Kiel miaj mensogpensoj el mi elkapiĝos,
Sensignifa — pri Ĉorlinski rakont' elvolviĝos:
Kiel Puckon li vojaĝis retojn aĉelonte.
Jen vi ploras dum rakonto, ridos jen volonte.

JUDO OFERAS AL ĈORLINSKI

MALJUNAN ĈEVALON POR AĈETO.

Ili iris por rigardi ordon en la stalo,
Kie staris jam maljuna, kreska virĉevalo.
Nobelulo enrigardis al ĝi en buŝegon:

— Ho! — elkrias — ĝi ja havas longan trontden-
tegon!

Kiom paĝis ci por tio? certe ne tro kare?

Ĝi malvidas dekstrokule ja de antaŭjare!

— Kiom paĝis mi — jud' diras — mia nur afero! —

— Nu, sed kia sur femuro sidas jen tubero? —

Nobelulo kl'inginte rimarkis brulstampo:

Kun la aglo, sceptr' kaj krono polblazonan kampen.

Kaj la judon li demande tuj okulmezuras:

— Ĝi ja estas de la pola armeo, mi juras! —

— Mi aĉetis — diras judo — ĝin dum aŭkciboro.

Laste estis ĝi servinta prusa ĉe majoro.

Ĉar neĵuna, ĝi ne estis ankaŭ multepreza,

Al la glitoveturilo taŭgos ĝi malpeza.

Sur ĝi sidis Mierostawski, pola generalo,

Satis ĝin kaj zorgis multe pri ĝi en la stalo.

Li rajdsarmis dum bataloj sur ĝi en la jaro

Ahtunfirĉoj kontraŭ prusa la militistaro!

Nu, rigardu, kiel saĝe ĝi eĉ instruita:

Fajtu marŝon, ĝi saltetos, kvankam alligita. —

Do Ĉorlinski blovis vanĝojn, faris rondbuŝeton.

Lipojn ambaŭ rulonis ĝi formante trumpeton

Kaj ekfajfis la kaŝuban marŝon altalote

Lau mazaruko de Dombrovski multkonata bone.

Eksentinte la fajfajon ĉeval' orelumis

Kaj laŭtakte marŝkonforme loke ĝi hufumis.

Nobelulo finfajfinte apenaŭ duonon

Pro ĝoj' donis al ĉevalo koran kisodonon.

— Nun mi vidas, ho ĉevalĉjo, cian bravvirtemon!

Sed ne pensu, ke mi volus montri la spitemon!

Cian polan la devenon graciaĉ' atestas,

Ke ci trafis al la judo, granddamaĝo estas! —

La grizulo kapon klinis kvazaŭ komprenante

Kaj nazflaris lian ĉapon ĝoje blovspirante.

La fiŝisto diris dume: — Kompalinda besto!

Mi alportos la avenon, iĝos por ci festo!

Sed por tio militiste ree ci dancados,

Setemerite ja neniu nune profitados!

*Melburna viro, kiu persone
konis Hans Christian
Andersen.*

En Melburno (Aŭstralio) ankoraŭ vivas homo, kiu, kiam li havis nur ses aŭ sep jarojn, sidadis horon post horo sur la genuo de Hans Christian Andersen, auskultante al tiuj rakontoj, kiuj post paŝo de iom da tempo, devis fariĝi famegaj inter la geknaboj de l' mondo. La feliĉulo, nun maljuna sinjoro, J. A. Heyman, ĵus dotacis al la Biblioteko por Infanoj en antaŭburo Prahnan grandan plakon faritan de li honore al la amata ĉabelmajstro, kiu antaŭ 100 jaroj sukcesis eldonigi sian unuan verkaĵon.

En parolado ĉe la transdona ceremonio, s-ro Heyman vortpentris la mondkonatan Danon laŭ rememoroj de tiuj longe pasintaj tagoj, kiam li vizitadis lin en Kopenhago.

„Mi ne klare lin rememoras, sed ja ankoraŭ tenas tion, ke li havis mildan vizaĝon, kaj ke li amis la geknabojn. Li devis tre pene labori, ĉar ĝis la tago de lia morto mankis al li sufiĉe da vivrimedoj, kaj pano estis ĉiam nur malfacile akirebla.

„Sed tio ne multe ĝenis lin, ĉar la mongajnado tenis por preskaŭ neniom da intereso. Efektive, en ĉiu afero li estis modesta homo, kaj tre verŝajne nenio estus pli embarasinta lin ol la grandiozaj monumentoj en la Reĝa Gardeno, Kopenhago, kaj tra Danlando, honore lian memoron“.

Se vi trovos vin apud la Biblioteko por Infanoj en Prahnan, ne preterlasu la okazon eniri por vidi ĉi tiun bronzan plakon, vere ĉelan. Frape prosperis al s-ro Heyman enverki en la vizaĝon sur ĝi la dolĉan esprimon de tiu larganima amindulo.

Ĉiu devus scii almenaŭ iom pri la vivo de tiu altŝtatura, malgrasa ŝuistofilo, kiu konis tiel bone la vojojn kaj loĝule-

*) En junio s-ro de P. E. el 1935 aperis artikolo de s-ro direktoro J. Orzech pri kaŝuba lando, lingvo kaj verkistoj. Ni petas relegi ĝin por ĝuste pritaksi ĉi-suban, tre interesan esperantigitan fragmenton el la poemo de Deroowski. La Red.

Do respondu, ĉu laŭmarŝe saltos ĉi denove,
Se kaŝuban mi ekkantus marŝon nun laŭpove?
Ekkapumis la grizulo kvazaŭ klardirante,
Ke laŭ tiuj bonkondiĉoj marŝos ĝi dancante.

CORLINSKI kantas la kaŝuban marŝon.

Nobelulo surlutbaskon dorse pligustigis,
Karestrapis la ĉapelon, manojn surlumbigis,
Kapen flanken iom kiinis, glatis hirtlipharon
Kaj komencis kanti ĝoje hejman landkantaron:
Kie Vistul' de Krakovo ĉe mar' pola ĉesas,
Pola kred' kaj polparolo orelon kareas.

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Kaj li ĉesis... tu ĝrifulo hufe frapas teron,
Do Corlinski ĝoje kantas plian ĉi verseron:

Kun Germanoj longajare ĉiam ni batalis,
Liberkanto milvoĉare en orelon falis.

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Venis roto de Krucistoj, dissemis suferon,
Sed kaŝubaj ĝin draŝistoj kaŝis sub la teron.

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Postenvokis nin ordono de Jagiello reĝo
Tuj fiera krucistkrono subiĝis al leĝo.

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Kazimiro reĝo pelis trans limojn Kruciston,
Lia haŭto iom ŝvelis spertinte batiston.

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Iam Svedoj nin ŝipare el fremdland' invadis,
Sed el Puck ni kapucare ilin forpeladis.

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Per la sankta kruc' signiĝos kun hakil' kaj reto
En inferon ni iuniĝos, foren diableto!

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Stanislao sankta nia tie naskiĝinta
Ne allasos, ke rabia estu pov' venkinta!

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Ploras patrin' pro la filo, ploras kaj knabino:
Ĉesu! nia Di' ŝirmilo gardos nin sen fin!

Do ne pereos Kaŝubo, nek veos,
Marŝu, korpon hardu, Dia pov' nin gardu!

Kant' finiĝis, sed ankoraŭ saltas la grizulo,
Kvazaŭ urĝa ĉe laboro la diligentulo,

Fine kaj ĝi trankviliĝis, kiam efo ĉesis.

Judo barbon pliglatigis, beston ekkaresis.

— Nu, vi fine proprokule al vi ekpersvadis,
Ke ĉeval', se eĉ maljuna, kiel in' dancadis. —

Nobelul' nenion diris, kuris for kun krako
Kaj revenis penspirante kun aven' en sako.

Li enŝutis la avenon en tuja momento,

La grizul' ĝin formanĝegis, ke nur grincis dento.

— Grincu, maĉu! ĉi karulo! se aven' bongusta.

Ĉin malsati ja permesi, estus tre maljustal —

Grizul' manĝis sen grimacoj, movis la buŝegon,

Baldaŭ ĉion ĝi transŝovis en sian ventregon.

Rimarko: En la jaro aŭtunfirĉh. La Kaŝuboj al-
proprigis al si kelkajn vorlojn el la lin-

tojn de Fel'ndo. Oni diras, ke
la fratoj Grimm konis la ho-
mojn. kiuj konis la koboldojn,
sed Andersen konis la kobol-
dojn mem.

Kiam li rakontis siajn unuajn
elpensajojn, preskaŭ ĉiu rigar-
dis lin kiel frenezetan, reviston
en kies kapo zumis muŝo, kaj
ili ne volonte lasis sin vidiĝi,
parolante kun li. Finfine Hans
ekpaŝis vojon al Kopenhago por
serĉi la fortunon. Sed multe da
nefeliciaj kaj manĝomankaj ta-
ĝoj devis forpasi antaŭ ol li
fam'iĝis, kaj eĉ ki m lia nomo
estis trekonataĵo li restis tiel
mallerta negoculo, kaj gajnis
tiel malmulte da mono pere de
siaj ŝabeloj, ke li fariĝis fraŭlo
tre maljuna antaŭ ol disponis
al li la vivrimedio necesaj per
kiuj li povus subteni ankaŭ e-
dzinon. Li do ne povis vidi ĉir-
kaŭ si la proprajn infanetojn,
kiuj aŭskultus liajn belajn pa-
rolojn. Cetere, estas strange,
ke li neniam alte taksis tiujn
verkajojn; li ambiciis brili en
la drama, romana, aŭ poezia
kampo. Sed malgraŭ ke li ne
povis tion, li fariĝis la plej gran-
da fe-rakontisto, kiu jam vivis.

R. Banham.

HILDA DRESEN.

NEĜEROJ.

Ho, kiel ĉarme:
Flirtas nun svarme
En la aero
Etaj lanugoj,
Helas sur tero
Blankaj neĝtukoj.

Kvazaŭ konkuro,
Vigla vetkuro
Estas la bela
Flugo senbrida
De la negera
Falo rapida.

Kia gracia
Danco glacia!
Flokoj ŝutiĝas
Lude nun, glite, —
Ĉio mutiĝas
Kvazaŭ sorĉite.

Baldaŭ poste ĉiu sciigo el Gdynia multoblan eĥon elvokas en la lando. Oni povis diri, ke la progreso de laboroj en Gdynia kvazaŭ instigis la tutan landon. Ĝi ne volis alian Gdynian ol tian, kiu en amerika ritmo sur sterilitaj sablatoj elkreskas.

Jam de kelkaj jaroj ĉiu somera bansezono estas kvazaŭ kampo por varbi milajn trojn da entuziasmoj de la Gdynia-haveno. Hodiaŭ ne estas en Polujo la librovendejo aŭ publika prelegejo, kie la gdyniaj novaĵoj ne estus haveblaj, respektive volonte aŭskultataj. Korespondantoj el Gdynia kaj primaraĵ ĝenerale estas bonvenataj de redakcioj de ĉiuj polaj gazetoj. Gdynia fariĝis la amata karolino de Poloj.

La ekonstruo de la haveno estis konsiderata de tiuj, kiuj povus ĝin malbondeziri kiel la pola aventuro en Gdynia. Baldaŭ la faktoj deĝis ŝanĝi la opinion. Nun eĉ malfavoraj homoj estas mirigitaj pro la surprza realo kaj kvankam ne tre volonte, sed nomas ĝin la pola miraklo de Gdynia. Tiel do elkreskis Gdynia, ĉi frukto de n'a laboro kaj persisto. Se eble vi iam venos Polujon, ne forgesu ĝin viziti kaj tiam vi samopinios kun mi, dirante, ke ĝi estas beleĝa kaj vere vidinda verko.

Tadeusz Hodakowski

AL LA INTERNACIA INSTRUISTARO. — Karaj ĝekolegoj!
Esperanto vivas ankoraŭ en Germanlando! Tie ekzistas — pri kiu vi ŝajne tute forĝesis — la INTERNA KORESPONDADO-OFICEJO de I.A.L.A. Ĉi tiu oficejo peradas korespondadon inter ĝenstruisoj kaj ĝlernantoj de la tuta mondo. La perado estas senpaga. Do, kiam vi scrĉas Esperanto-korespondadon, anoncu vin ĉe ni! La anonco enhavu jenajn informojn: kompleta adreso — aĝo — speco de la lernejo, en kiu vi instruas aŭ kiun la ĝlernantoj vizitas — nombro de la anoncintaj knaboj kaj knabinoj — dezirita temoj kaj interrilatoj — specialaj deziroj. Kiam mi ricevos, sufiĉe da materialo, mi aperigos viajn anoncojn en apartaj korespondad-listoj. Ĉi tiuj listoj aperos kiel aldonoj al Internacia Pedagogia Revuo en marĉo, marto, junio, julio, septembro kaj novembro de ĉi tiu jaro kaj tiamaniero estos disvastigataj en ĉiuj landoj.

La sekretarino **Marta Moelke**, Berlin-Steglitz, Hünensteig 8a

DR. WALERY GOETEL, prof. de l' Minista Akademio en Kraków

NATUREZERVAĴOJ KAJ NACIAJ PARKOJ EN POLLANDO.

Polujo estas unu el ne multaj landoj de Eŭropo, en kiuj konserviĝis rimarkindaj teritorioj de naturo, restinta en preskaŭ ne tuŝita stato. Tial sciencaj, turismaj kaj kulturaj faktoj de Polujo kondukas de longaj jaroj streĉitan laboron, por tiun belan naturon konservi kaj restigi por bono kaj uĝo de l' homaro. Al tiuj laboroj kontribuis abundan helpon kaj protekton la Pola Registaro. Dank' al tiu harmonia kunagado la tuta laboro disvolviĝas prospe-ve. Per decidoj de proponoj, per ordonoj de aŭtoritatoj kaj elaceto de teritorioj, ekstis en Polujo 130 malpli grandaj rezervajoj kaj 6 grandaj teritorioj de naturprotektado, alivorte de Naciaj Parkoj.

Rezervajoj kaj Naciaj Parkoj ekstis en ĉiuj regionoj de Polujo, kaj la naturo bone kaj bele konserviĝs kaj same en regionoj malaltaj, kiel en montaj.

En nordorienta Polujo etendiĝas ampleksa teritorio parte tute plata, parte ondumita je ne altaj montetajoj. Ili estas ĉirkaŭajoj de Wilno kaj Grodno, kaj de tiuj urboj suden etendiĝas plataĵo, nomata Polesie. Inter vastaj foli- kaj pinglo-arbaroj situas ĉi tie multaj lagoj. Kelkaj el ili, kiel ekz. Verdaj Lagoj apud Wilno, distingiĝas per beleĝa koloro de akvoj, en kies supraĵo rebrilas multkolora bildo de l' cielo. Sur ebenaĵo de Polesie atendiĝas senfinaj teritorioj de akvoj kaj arbaroj. Sur tiuj akvoj oni povas migradi dum semajnoj per boato, saligante siajn okulojn per vidaĵoj de pra-a kaj bone konservita naturo.

La nordorientajn teritoriojn de Pollando loĝatigas multenombra bestaro. En la arbaroj ĝisvivis la hodiaŭajn tagojn jam malĉfa alko, urso, lanko, ŝveĝa kato, tie kaj je vidiĝas lupo, Aproj, cervoj, kapreoloj, leporoj kaj aliaj bestoj estas ordinariaj. Super akvoj ŝvebas senncmbraj aroj da sovaĝaj anasoj kaj de alia akva birdaro. En arbaroj okazigas siajn amsole-

naĵojn ĝradiozaj urugaloj kaj tetroj, en aero ronde flugas multaj rĥobirdoj.

En la plej bela kaj plej bone konservita parto de arbaroj en nord-orienta Polujo kreis la Pola Registaro, kin ĉi tie estas propra de grandaj arbaraj teritorioj, grandiozan Nacian Parkon, nomatan Bialowieza (elp.: Bialowjeŝa). Tiu parkon oni aranĝis sur teritorio de ĉirkaŭ 6000 hektaroj, en koro de granda arbarkomplekso, nombrata ĉirkaŭ 200,000 hektaroj.

Kiam ni eniris en Nacian Parkon, ĉirkaŭas nin la ĉarmos de praaj arbarego. En ĉiuj flankoj altencelas graciaj arboj, kies suproj malaperas en subĉielaj steroj. Tie kaj je kuŝas potencaj arbotrukoj, renversitaj de ventegoj aŭ falegintaj pro maljuneco kaj, putrante malrapide, saĝiĝas je humo. De sur la tero leviĝas alten verdaj kreskaĵoj de arba junularo, grim-pante supren al la lumo. En haso de branĉoj, arboreverŝaĵoj inter marĉaj muskejoj kaj malsekaj koletoj farigas sovaĝaj dezertejoj. Empaŝante en ĵin la homo travivas profundan impreson, ke malfermiĝas antaŭ li pramahova arbarego mez-epoka, arbarego de polaj reĝoj el dinastio de Jagelidoj, kinjam en tiu ĉi arbarego ĉasadis.

Karakterza trajto de la Bialowieza arbaro estas ekzistado en ĝi de variegeaj arboj. Do: kverkoj, fraksinoj, behuĵoj, litifoj kaj aliaj foliaj arboj, piceoj, pinoj kaj aliaj pinglarboj ligas sin ĉi tie je diversaj grupoj, kunvivante en reciproka harmonio. De tie devenas nekultiva diverseco de l' arbarego, malgraŭ ke ĝi ampleksas nur malaltajn arbaregojn. En la Nacia Parko tiu pitoreskeco aperas en aparta pompo, ĉar la arboj estas tre altaj kaj atingas 40- aŭ 50-metran altecon.

Tiuu ritecon de arboj respondas variece de plantoj flori kaj malaltfrangaj.

Ankaŭ specifa estas la mondo de bestoj. El la „granda“ bestaro: cervoj, lanko, lupoj kaj aproj, plue kapreoloj, vulpoj, meloj, leporoj, musteloj, el birdoj tetroj, kaj eĉ tiom maloftaj nigrĵaj cikonoj konsistigas la bildon de faŭno en la pola malaltajo. Sed la besto, kin estas la plej granda ornamo de l' Bialowieza arbarego estas uru.

Uroj konserviĝis en Bialowieza arbarego ankoraŭ el tem-

zig malgraŭ la mondkrizo multe disvolviĝis, dum en la aliaj baltaj kaj germanaj havenoj la trafiko rimarkinde malkreskis. Do Gdynia ne estas ĝia konkuranto.

Kiel mi antaŭe menciis, ni posedas 74 kilometran marbordon, kaj kompare kun la nombro de loĝantaro al unu kilometro de tin, ĉi premas preskaŭ duona miliono da homoj. Fakte verŝajne ne renkontata en la mondo. Do ankaŭ la interesiĝo pri la maro devas esti ĉe ni multe pli forta, ol ĝi estus alikaze.

Krom la haveno dum tin mallonga tempo ni sukcesis ĵam konstrui kelkdekon da komercaj kaj personaj ŝipoj kaj grandajn ŝipojn oceanajn. La registaron helpas en tio privataj personoj, konstruante siajn proprajn. La socio multe helpas tin laboron, ne ŝparante la monon por tin celo. La konstruado de la haveno en Gdynia ne estas ankoraŭ finita, sed ĵam nun ĝi alboriĝas grandajn venantajn ŝipojn kaj la nomo de tin haveno farigas ĉiam pli multe konata. En nuna stato de l' laboroj en Gdynia troviĝas nun 6 grandaj basenoj kaj 16 kajoj kun plej modernaj uzinoj kaj aranĝoj.

Por certigi al la haveno kvietajn akvojn, oni konstruis grandajn ondromplitojn.

La haveno transŝarĝas nun unu kaj duonan milion da vaĝonoj tage. Ĝi posedas la plej fortan lumturon ĉe la tuta Balla maro. El Gdynia kondukas nun kelkaj reĝinaj ŝiplinioj kaj niaj ŝipoj entreprenas vojaĝojn al multaj landoj de terĝoboj. Por niaj elmigrintaj samlandanoj ili estas la heroldoj de hejmal informoj, alportas konsoloj en la nostalgia vido.

Krom diversaj havenaj aranĝoj en Gdynia vinda estas tie granda senseliĝejo de rizo, konstruita tie de niaj bankistoj. Ni ankaŭ konstruis en Gdynia grandan malvarmumĝejon por vian-do, eksportata allandane.

Gdynia ekestis kaj kreskas sur ondo de simpatio de tuta Polujo. La publika opinio favoras Gdynian preskaŭ de la komenco mem kiel verkon elkreŝkintan el bezono riĝardi ion propran, hejman sur nia propra marbordo. La decido pri la havenaj laboroj estis komence akceptata kun kelka skeptikeco, sed baldau ĝi estis sentata kiel io neprea, vivbezona por la nova ŝtato.

ĝi nombris nur 568 loĝantojn. La neceso igis tie konstrui nuan propran havenon. Malfacilaj estis la unuaj komencoj. La loko ne estis tro taŭga por haveno, ĉar la maro estis tie tro malprofunda. Oni devis la fundon malaltigi ĝis 8—12 metroj. Tiam la haveno ekkonstruiĝis en vere amerika ritmo kaj rapido. Post kelkaj jaroj el preskaŭ senŝignifa vilaĝeto fariĝis rimarkinda moderna urbo, modele kaj laŭplane konstruita kiu hodiaŭ posedas pli ol kvindekmilan loĝantaron.

Ĉie en la mondo furiozas la terura krizo, pereigante diversajn instituciojn, fabrikojn, kiuj eĉ multjaran historion posedis. La krizo preskaŭ nenium sparis. Sperlis tion precipe industrio, sentas tion ankaŭ agrikulturo. Simile en nia lando ĝi estas rimarkebla, eble ne tiel, kiel ĉe la popoloj kun multe disvolvita industrio, sed tamen sentige! Malgraŭ malfacilaj tempoj, Gdynia kun ĝiaj aranĝoj kreskas kaj grandiĝas. Gdynia, ĝia rapida kresko estas la plej bona pruvo, ke sian propran havenon la lando nepre bezonegis.

Ni ne estas kompletaj novuloj en la marista fako. La historio montras, ke inter malkovrintoj de nekonataj teroj ofte estis ankaŭ Poloj. Sed la malkovraj ekspedicioj estis aranĝataj ne sub la pola flago, ĉar la ŝtato estis tiam mallibera, tial la malkovrojn oni atribuis al aliaj popoloj.

Nur kelkaj el iamaj niaj reĝoj komprenis la gravecon de la maro, sed aliaj tute malzorgis ĝin. Poloj satus kulturi la teron, sed ne zorgis pri komerco, kiu estis de ili malfacila, al nobelaro eĉ malpermesita. Tio estas la kaŭzo, ke niaj tradicioj maraj ne estas tre fortaj. Gdynia plej bone montras ke la antaŭaj preferoj ŝanĝiĝis kaj ankaŭ sur tiu kampo ni povas kunlabori kun aliaj popoloj.

Gdynia ne estas konstruita por konkuri kun libera urbo Danzig. Absolute ne!

Ĉiu povas bone kompreni, ke tridek tri miliona, ĉeie agrikultura popolo kredeble havas intensajn importon kaj eksporton, kiujn ne povas kontentigi ununura al ni profittebla haveno en libera urbo Danzig. La aranĝoj en ĝi montrigis multfoje nesufiĉaj kaj tial estis necese komenci konstruon de nova haveno, neprege fenestro al la vasta mondo. Stalistikaj nombroj evidentigas, ke dum la postmilitaj jaroj Dan-

poj de sendependa Polujo mezepoka kaj dum rusa regado ili estis zorgplene protektataj en fama ĝis bestogardeno, tiel ke ilia nombro antaŭ la milito kreskis ĝis 700. Tamen ofteĝaj marŝoj de armeoj dum la milito, mortigo de granda nombro da uroj en unua momento de milita invado en la arbarego, kaj fine rabcastoj ekstermis la urojn komplete. La lasta besto mortfalis en j. 1920.

Tamen feliĉe konserviĝis ne multaj uroj el speco de eŭropa uro (Bison europaeus) en aliaj partoj de Polujo kaj en kelkaj bestogardenoj eŭropaj kaj de tie la Pola Registaro aĉetis kaj venigis kelkajn urojn, kiuj en j. 1929 estis reenlasitaj en la arbaregon. Estis kortusa momento: la reĝo de la praarbarego revenis en sian patrujon.

De tiu tempo la uroj vivas en aparta kelkdekhektara ĉirkaŭbarilo sub zorgema protekto de faka personaro de direkcio de ŝtataj arbaroj en Białowieża. Dank' al venigo de pluaj individuoj kaj pro natura multigado la nombro da uroj kreskis ĝis 12 kaj ekzistas bazohava espero, ke ĝi kreskos plue.

Krom la Nacia Parko troviĝas naturhistoria muzeo en Białowieża kaj turistaj rifuĝejoj. La turisma movado al la Białowieża Nacia Parko kreskas ĉiame. En j. 1933 la nombro da vizitantoj superis 15 milojn. Inter la vizitantoj estas ĉiam pli multaj fremdlandanoj, kiuj pri la Parko parolas kun granda aprobo, kiel pri ununura tiom grandioza protektejo de mallaltaj naturo.

Diligentan atenton oni dediĉis al la kreado de Naciaj Parkoj en Karpataj montoĉenoj, eĉ endiĝantaj sur sudaj limoj de Polujo sur longa spaco, nombranta ĉ. 900 km, de urbo Cieszyn, okcidente, ĝis tiu loko oriente, kie kuniĝas la limlinioj de tri ŝtatoj: de pola, ĉeĥoslovaka kaj rumana.

En Karpataj montoĉeno estas projektata la plej grandioza Pola Nacia Parko en Tatroj, la plej grandaj montoj de Polujo kaj de meza Eŭropo sur spaco de Alpoj ĝis Uralo (la kulmina supro de Polaj Tatroj, nomata Rysy, atingas 2.503 m.). Tatroj formas veran fortikejon rokan, kronitan per graciaj kaj akraj suproj kalciaj kaj granitaj. Inter ili dormetas belegaj la-

ĝoj kaj lagojtoj kun purega akvo, rebrilanta per ĉielarkaj koloroj. El lagoj kaj lagojtoj faladas perlecaj torontoj kaj akvo-faloj, sur arupitaj vandoj de Tat'raj suproj konserviĝas blankaj makuloj de eternaj neĝoj. Sur dorsoj kaj en valoj interdensaj kampoj de montpino, etendiĝas verdaj herbejoj postetoj kun originalaj montarataj budoj. La rokajn deklivojn surkreskas abundaj, malhelaj arbaroj kun piceoj, kaj fagoj. Inter tataraj floroj ekfloras printempe rozaj kaj violaj krukusoj, scmere kaj aŭtune malhelbluaj ĝencianoj, sur kalciaj suproj abunde kreskas blankaj leontopodioj. En valoj kaj sur tataraj suproj vivas ĉamo kaj marmoto, en arbaroj kaj herbejoj cervoj, en rokaj kavaloj marmotoj. Ĝis hodiaŭ tagoj vidiĝas ĉiam kvankeam malofte urso, lanko, sovaĝa kato kaj roka aglo.

En Tatra Parko estos protektata pezaĝo, plantaro kaj faŭno en du strefoj: en absoluta rezervalo, en kiu tiu ain homa marmotado estos malpermesita kaj en parka rezervajo. La areo de Nacia Parko sur pola teritorio ampleksos en la du strefoj pli ol 20,000 hektarojn.

La bazo por formi Nacian Parkon en Tat'roj estas granda arbara teritorio de tiel nomata Kórnik'a fondado, ĉ. 8000 hektaroj, kiun donacis al la pola nacio granda batalinto pri Tat'raj ideoj, karmemora grato Władysław Zamoycki. Tiu teritorio kaj ankaŭ la najbaraj teritorioj arbaraj kaj rokaj estas transprenitaj respektive acetitaj de la Pola Registaro kaj Pola Tatra Societo, tiel, ke hodiaŭ en Pola Tat'roj pli ol 10,000 hektaroj estas submetitaj al la protekta mastrumo.

Tatra Nacia Parko Pa ko sur pola teritorio najbaras al la protektata Nacia Parko malantaŭ la ĉeĥoslovaka limo, kie ankaŭ estas farataj preparoj per fondi tie nacian parkon, subleatitaj de l' registaro kaj organizaĵoj de ĉeĥoslovaka socio. Ambaŭ partoj de l' Nacia Tatra Parko fondos apudman parkon de naturo, apogitajn sur samaj pintoj. Kunlaboro de ambaŭ ŝtatoj sur tiu kampo estos okazigata per specialaj komisionoj.

Komplete jam preta Nacia Parko ekzistas en alia monta nesto de Karpatoj, nemata Pieniny, situanta preskaŭ 40 km nordorienten de Tat'roj. En tiuj montoj, famaj pro pitoreskeco de sovaĝa montobereco farita de akvoj de Dunajec-rivero tra

libera, vi ne povas imagi, kiel valora, kia trezoro estas la libereco. Vi kutimis vivi en libereco jam denaskaj; la libereco ŝafnas al vi esti tiel natura. Kiel estas la suno aŭ aero, vi ne povas ensentiĝi en animon de l' mallibera homo, kaj vi ne povas kompreni la grandegan ĝojon pro la reliberiĝo.

Sed nun imagi: vi estas libera, kaj ĉirkaŭ vi ruinoj, ruinaj, ruinaj. Kaj en tiu stato ni devis denove baraktadi, ĉar la najbaraj pretendoj estis senlimaj. Batali en tiuj cirkonstancoj estis verca herereco. Kaj kiam la okcidenta Eŭropo jam delonge riparadis tiom, kien la milito detruis, fine en la jaro 1920 post fino de l' kontraŭbulŝevika milito, ankaŭ ĉe ni eksistentis la kanonoj.

Post la lasta packontrakto en Riga ni povis mezuri la teritorion, kiu estis aljuĝita al ni. Laŭ nombroj evidentigitaj, ke ĝi okupis sesan lokon en Eŭropo, koncerne la grandeccon de l' teritorio kaj ankaŭ la sesan koncerne la nombron de ĝiaj loĝantoj. Nun ni havas 33 milionan loĝantaron. La lando ricevis 75 kilometran marbordon.

El historio vi scias bone, kiel grandegan rolon ludis la maroj en disvolvigado de popoloj. Vi scias, ke la lulilo de l' eŭropa civilizacio estis la landoj ĉemaraj. Vi komprenas la gravecon de l' maro.

Apenaŭ du jarojn ekzistante, ni spertis jam tion en la j. 1920. La maro obliĝis al ni tiam la venigon de l' municipo kaj finan venkon. Ĝi decidis pri nia ekzistenco kaj libereco. Ili, dĥaŭ ĝi decidis pri disvolvigado kaj grandiganta forto de la ŝtato.

Sekvante la verkojn de nia verkisto Ĵeromski, kaj tiupa de angla poidevena verkisto Józef Conrad Korzenowski, la inklino de pola socio turtiĝadis al la maro. Ili estis komence nur inspiroj de l' fantazio, malfortaj revoj promesantaj, ke sur tiuj 75 kilometroj da nekultivita tero ni povos fruktedone labori.

Kaj tamen!

Pripensu nur! Parolu al vi la faktoj!

La nuna pola havono Gdynia ankoraŭ en la j. 1921 vivis duondorme kiel dararanga fiŝkaptista vilaĝo sur malriĉa kaj mizera marbordo. Kiam Gdynia ekapartenis al la pola ŝtato,

gvo germaua. En la jaro 1843 estis insurekcio kontraŭ prusa okupacio en Crandpolujo sub generalo Mierostawski, celere malfeliĉa.

LA MONAĤO KLARIGAS AL ĈORLINSKI la portretojn de kaŝubaj princoj en cistersana monaĥejo en Oliva (apud Danzig — Gdańsk).

...Do kondukis lin monaĥo tra preĝejo tula Ĉe l' altaroj kaj skulptaĵoj tra sileto muta, Montris al li eĉ kun dekkvin ventuoj organon Kaj pentraĵojn, kiuj ĉien famigis ordenon. Apud ĉefa la altaro veraj bildtrezoroj Pendas supre la portretoj de ĉendinsinjoroj. Inter ili pendas princo de kaŝuba tero En la kaskoj kaj kirasoj forĝitaj el fero. La monaĥo al Ĉorlinski la nomojn instruas, Dume tiu aŭskultante nekutime ĝuas. — Jen ĉi ... en Danzig dum antikvaj jaroj Havis faman tre kastelon kun bastionaroj. For de Stupsk Pomerani' ilin apartenis, Kaŝublingve hejmparoli ili sin ne ĝenis. Jen Subislav' kun vizaĝo milda kaj senpeka Kristaniĝis en la jaro mil cent kaj kelkdeka. Poste estis de Jezuo servist' li fidela. Post li sekvis Subislavo kaj Lŝcug', estr' kastelo. Mŝcug' vestita kiel reĝo kun sigela stampo Venkis Rusojn ĉe Vistulo sur Mozgava kampo. Tuj apude trat' samsangar, Dua Subislavo, Pli inklini al preĝad', ol al mortiga glavo. Kaj nun sekvas la Mŝcugido, Svantopelko princo, Kiun German' ne aludas sen kolera grinco. Bravec', ruzo kaj obstino, artifik' provi'a

RADIO.

18. II. Dr. Feliks Burdecki: Polaj eltrovaĵoj.

3. III. Mgr. Tadeusz Hoda-kowski: Manpleno da plej belaj legendoj polaj.

17. III. Prof. Dr. Odo Buj-wid: Gvidindikoj de marŝalo Pił-sudski por la Nacio (fragme-toj el „Skribverkoj kaj ordonoj“).

31. III. Dr. Adam Gadomski: Kuriozaĵoj de kuracakvoj en Pol-lando.

La prelegoj okazados marde je la 22h45m. ĝis 23h. MET. El-sendas Kraków kaj Warsz wa. Ĉiam aŭskultu kaj danku al Pol-skie Radjo, Warszawa.

Aperis Jarlibro de la Espe-ranto-Movado 1936, eldonita de U. E. A. kiel suplemento al la eldono 1934. Formato de nor-mala Jarlibro: 80 paĝa.

akraj rokoj kaj densaj arbaroj de montaj interkrutejoj, Pola Re-gistaro acetiis en lastaj jaroj la plej bone konservitan parton kun areo de pli ol 760 hektaroj kaj ŝanĝis ĝin je kompleta re-zervajo. Tiamaniere konserviĝis antaŭ de ruo unika en sia spe-co pejzaĝo de krutaj rokoj kalciaj, surkreskintaj de grandiozaj arbaregoj, en kiuj videblas takuso aŭlicke jam ekstermita kaj beleĝa plantaro, floranta sur herbejoj kaj interbaroj. Et ra-vidiĝaj ondoj de Dunajec estas protektataj noblaj fiŝoj, salmo kaj truto, kaj en aero maloftaj birdoj kun gufoj kaj diversaj specoj de raba kaj kanta birdaro. Sur ĉefoslovaka parto de Pieniny kreis la ĉeĥoslovaka registaro antaŭ rezervajon kun areo de pli ol 400 hektaroj, ampleksanta tre belajn arbarojn kaj rkojn apud rivero Dunajec. Ambaŭ rezervajoj pola kaj ĉeĥoslovaka posedas siajn komisionojn, konsistantajn el respe-ktivaj sciencistoj kaj turistaj fakuloj. Tiamaniere estas fak'e kaj formale kreita unua apudlima Parko de Naturo en Eŭropo. Baldaŭ aperos publikajo pri tiu parko, eldonota de Ĝene-rala Direkcio de Ŝtataj Arbaroj en Warszawa.

Sur kontraŭsituita limo de potenco Karpata ĉeno estas fondita komenco de Orient-Beskida Nacia Parko en plej alta grupo de tieaj montoj. Czarnohora (2057 m). Gi estas montara teritorio, konstruita el vastaj kupolaj montodorsoj, surkreski-taj sur deklivaj per densa mantelo de arbaregoj, pli supre ko-ritaj per grandaj herbejoj. En grupo de Czarnohora ekzistas sur tereno de polaj ŝtataj arbaroj rezervaĵo kun areo de ĉirkaŭ 2 000 hektaroj; ĝi estas eminenta ankoraŭ plivastigita. Kurio-zaĵo de la Nacia Parko krom la sovaĝa kaj praa naturo restos la mondo de bestoj, en kiu reĝas urso, lupo, cervo, ankaŭ limko kaj sovaĝa kato.

Fine ni pripensas kaj preparas kreon de granda rezer-vaĵo por karpata bestaro en orientaj Karatoj, en ĉirkaŭnaĵo, kie kuniĝas limo de Polland' Ĉeĥoslovakuj' kaj Rumanujo. Tie en grandaj arbaregoj apud montara rivero Czeremosz estos speciale protektata granda karpata bestaro, kiel cervo karpata, urso, kies pli ol 200 ekzempleroj ĉi tie ekzi-stas, lupo, sovaĝa kato kaj montaj birdaro, en riveroj kelkaj specoj de salmo kaj truto. Tiu rezervajo, kiel kutime rez'er-

De li estas al Kaŝubo herede ligita.
 Lin eterne memorigos epopeaj rimoj,
 Ĉar ĝis Notec' etendiĝis per li kaŝblimioj,
 Jam ne tiel forta estis de Mŝeug' Dua povo,
 Kiu helpis la Ulnulon veni al Krakovo.
 Bedaŭrinde ne naskiĝis al li heredanto,
 Do Krucistoj penis iĝi de land' posedanto.
 Ke ne falu sub Germanon patra la terzono.
 Li ĝin cedis testamente al la pola krono.
 Tial iĝis la Polujo nia protektanto,
 De Kaŝuba nia lando ŝildo kaj ŝirmanto.

Nobelulo la parolon de monaĥ' atentis
 Kaj en koro grandan ĝojon kaj fieron sentis.
 Li do diris adiaŭe: Ĉion mi rakontos
 Al Kaŝuboj kaj fremduloj, kiujn mi renkontos.
 Ĉar mi ĝojas, ke Kaŝuboj antaŭ kelkjarcentoj
 Havas ankaŭ indajn estrojn, kiel fortaj gentoj.

Tradukis Józef Orzech

Rimarkoj: En la cistersana monaĥejo en Ol'va apud Gdańsk — Danzig estis konata, granda orgeno, plej ampleksa ĝis la XX jarcento sur la tuta teritorio de iama Polujo. Slupsk — germane: Stolp, urbo en germana Pomeranio.

La Ulnulo — reĝo Władysław (Ladislao), elpelata trifoje el la lando de reĝo Vaclavo II, la ĉefa line ekposedis Krakovon en la jaro 1306 kaj reĝis poste ĝis la jaro 1333 kiel pola reĝo. Pro sia malgranda staturo li estis nomata: ulnkreska, ulngranda reĝo.

La decembra numero de „La Juna Vivo“ entenas simplan teatraĵon por ne-fakuloj („La Novaj Vestoj de la Reĝo“, laŭ la de Zamenhof tradukita fabelo de Andersen). — Ĝi taŭgas por niaj klub — kaj fest — vesperoj. La grupoj ne bezonas elspezi multe, ĉar por 4.32 zl. oni ricevas ekz. plus la prezentaĵton.

La libro de Edward Bellamy, la amerika eminenta pensulo post kelkaj monatoj aperos en Esperanto. Ĝi estas tradukita de anglo, sro Elwell.

De multaj flankoj jam atingis nin petoj kaj nun oni jam povas mendi ĝin sen pagi ĉe K. J. Vernooij, le Jac. v. Campenstr. 26 hs. Amsterdam Zuid, Nederlando.

Ĝi estas la unua verko de li „Looking Backward“ (Rerigardo). La prezo estos 1,50—1,75 nederlandaj guldenoj.

vajoj por bestaro, devos posedi grandan areon de kelkdek miloj da hektaroj, kion oni povas ĉi tie atingi en unupeca komplekso de ŝtataj arbaroj kaj de grandaj privataj terenoj, ekzistantaj sur najbaraj teritorioj de pola, rumana kaj ĉeĥoslovaka landoj. Respektivaj laboroj interkompenĝaj de oftajaj kaj socialaj faktoroj de tiuj tri ŝtatoj jam komenciĝis.

Tiamaniere la ideo de naturprotektado en Polujo transpaŝis la ŝtatumojn kaj fariĝis unu el faktoroj de internacia proksimiĝo.

GDYNIA — LA POLA HAVENO.

El funcoj kaj vaporoj nititaj, el bruo kaj grimco batala elligis la bildo de libera Polujo en la jaro 1918. Gojiĝa estis por ni la fakto mem, ke ni reakiris la sendependecon kaj memstarecon, sed kiel malgojiĝa estis la bildo de tiu reliberigita lando! Pro la nititaj, longjaraj agadoj sur la pola tero, la tuta racia konstrumado de la lando kaj ĝia havaĵo estis pereigita.

Milionoj da domoj forbrulintaj, miloj da pontoj ruitiĝitaj; kampoj kavernigitaj de kanonoj kaj situantaj senfrukte, precipe ĉe orientaj limoj — jen kia estis la bildo de l' nova renaŝkiĝinta ŝtato.

Sed ne estis la tempo por bedaŭroj kaj sentemiĝo. Oni devis tuj ekagi por forviŝti la postisiginojn de l' longjara batalado, kiu en meza Eŭropo, ĝuste sur polaj teroj furizis. Oni ekagis sur ĉiuj kampoj de l' socia kaj nacia laboro por sanigi la vundojn, kiujn ni ne malhavis.

La situo estis tiom pli malfacila, ke apenaŭ reliberiginte, ni devis pene streki najajn fortojn por reteni nian sendependecon, kiam oni denove insidis.

Kara samideano kiu min aŭskultas, mi ne scias, al kiu nacio vi apartenas, tio estas al mi tute egala, sed mi supozas, ke kiu ajn vi estas, ne estas al vi fremdaj la grandaj signaloj venintaj el Francujo: libereco, egaleco kaj frateco. Libereco, kiel beleĝa vorto! Eble vi ne komprenas, kiel bela ĝi estas! Vi, felica samideano, kiu eble neniam estis mal-

DANLANDO — LA PARADIZO EN LA NORDO.

Esperantistoj tutmondaj hel-
pu nin konvinki la danan gazetaron kaj
okupi la danan radion!!

Kion vi, kara leganto, scias pri la da-
na lando? Certe nur, ke la lando kuŝas
en la nordo kaj ke ĝi eksportas bueron
tre bonkvalitan. Vi certe ne scias, ke la
lando estas belega turistlando en ĉiuj se-
zonoj de la jaro, ke marbanejoj abundas,
ke la dana popolo verkis literaturon al-
kvalitan, ke la danoj vivas kiel en ŝla-
rafo-lando (fabela lando, kiun oni nur
atingas tramanginte sin tra montego de
rizokaĉo kaj en kiu rostitaj porkoj kun
manĝilaro en la dorso promenas sur la
stratoj pretaj esti manĝataj de la feliĉaj
homoj). Veninte en danan domon la unua
demando de la mastrino al vi estas: „Ka-
ra gasto, ĉu vi jam manĝis?“ Bona kafo
kaj bonegaj kukoj estas ĉiutagajoj kom-
preneblaj en la dana hejmo. La Danoj
vivas en „Mangukuko“. En multaj lan-
doj la zorgo ĉiutaga estas manĝi sufiĉe,
en Danlando estas rekomendinda (ego)
zorgi pri la malo. Danlando estas vera
paradizo. La danaj Esperantistoj volas
volonte al vi malfermi sian belan landon
per radioparoladoj, sed ili bezonas vian
helpon.

La cirkonstancoj al Esperanto nun es-
tas tre terhoraj en Danlando. La propa-
gando en la lastaj jaroj estis tiom efika,
ke hodiaŭ ĉiu minimume scias kio Espe-
ranto estas. Tamen, la Danoj estas tre
realpensantaj. Ofte ili argumentas, ke ili
lernos Esperanton kiam ĝi estos uzata
en la dana radio. Multaj rondoj volus o-
kupiĝi pri Esperanto, ili nur timas, ke
Esperanto ankoraŭ ne estas vaste uzata
en la mondo. Tiun dubon ni nur povos
forigi per granda helpo de ekstere kaj
per la subteno de la grandaj gazetoj. Ĝis
nun la grandaj gazetoj absolute silentis.
Ni povas kapti la gazetaron kaj la radion
samtempe, se vi, karaj Esperantistoj en la
tuta mondo, fakte komprenas mian al-
vokon kaj skribos multnombre.

Lumbildserioj pri Da-
nlando por Ĉe-instruistoj.

La turistunuigo en Kopenhago tre ŝa-
tas la helpon de la Esperantistoj kaj el-
donas jam kelkfoje prospektojn en Es-
peranto. Vere granda sukceso estas la
disponigo de kvar belegaj lumbildserioj
kun Esperanto-tekstoj por paroladoj pri
Danlando. La serioj unuavice estas por
Ĉe-instruistoj, kiuj laboris en Danlando
kaj en siaj novaj laborlandoj ŝatas paro-

li pri Danlando. Ĉe-instruistoj aŭ aliaj
Esp.-parolantoj, kiuj ŝatas havi la lumbil-
dojn aŭ la belegajn prospektojn, estas
petataj skribi al „Turistforeningen for
Danmark“, Kopenhago.

Kiel ni povas interesiĝi la gazetaron
kaj la radion?

Ni rigardu nian Esperanto-historion! Es-
stis antaŭ unu jaro, kiam niaj amikoj en
Italio sukcesis okupi la radion. En la
pasinta printempo la italaj Esperantistoj,
organizintoj de la pasintjara kongreso,
per lerta ŝaktiro enigis Esperanton en la
italan radion. Kiel ili faris tion? Ili skri-
bis en la Esp.-gazetoj se la Esperantistoj
tutmondaj grandnombre skribos al la ita-
la radio, ni eble sukcesos aranĝi Esp-
dissendojn. — La Esperantistoj kompre-
nis sian devon kaj skribis amase. Jam
kelkajn semajnojn poste ni ĝuis la unuajn
komunikajojn pri la kongreso. La kongreso
estis grandioza propagando- sukceso kaj
nun la regulaj dissendoj de la italaj sta-
cioj pliriĉigas la konstantan radioprogra-
mon.

En Danlando en la lastaj jaroj Espe-
ranto disvastiĝis mirinde. Tamen la tu-
ta afero estas portata nur de tre mode-
sta privata laboro de kelkaj aĝemuloj.
Mondfamaj estas la ĉiusomeraj Esperan-
tokursoj en Silkeborg. Ankaŭ en la ve-
nonta jaro okazos grandaj kursoj en Sil-
keborg, Kornmodskole. Sed, se ni fakte
volos labori grandskale, ni devos nune
atingi la radion. Antaŭ kelkaj jaroj oni
ekuzis nian lingvon en la bonega stacio
Kalundborg, sed poste oni ĉesis la dis-
sendojn. Nun estas nia tasko denove ma-
turigi tiun gravan nordan stacion. Sukce-
son ni nur havos, se ĈIUJ Esperantistoj
leginte aŭ aŭdinte pri niaj klapodoj tuj
skribos aŭ leteron aŭ poŝtkarton al la
plej granda gazeto dana al la gazeto „Po-
litiken“, Kopenhago. La skribkapablaj
mondlingvanoj estas petataj skribi mal-
longajn artikolojn al la gazeto en Espe-
ranto. Ĉiuj sendu ankaŭ la prospektojn
ktp., kiuj aperis en la diversaj regionoj
de la mondo. La Esp.-redaktoroj nepre
sendu unu numeron de sia gazeto, se eble
kun tiu ĉi artikolo. La artikolo ja mon-
tras, ke ni uzas Esperanton por fari pro-
pagandon por la diversaj landoj kaj por
la turismo.

La „Politiken“, Kopenhago (adreso su-
fiĉa) aperadas regule kaj ĉiutage en la
eldonnombrego de 144.000 ekzempleroj.
Mi petas ĉiujn seriozajn kaj propagande-

majn Esperantistojn tuj skribi al tiu gazeto. Se tiu gazeto subtenos nin, ni havos facilan laboron en la tuta lando. La cirkonstancoj fakte estas tre fervoraj al nia afero, mankas nur la granda atako de ekstere. Antaŭ kelka tempo klarvidanta samlingvano skribis en „Heroldo“: „Ni ne disigu niajn fortojn malsaĝe, sed ni komune prilaboru nun landon post la alia: Ni komencu eble en Danlando! La lando ne estas tro granda kaj ni povas facile tiri la tutan landon en kvazaŭ Esperanto-febron!“ Nu, bonvolu, nun estas eblo montri, ĉu ni fakte sen multaj vortoj kapablas fari grandan laboron.

Skribu, ke vi deziras aŭdi per la radio en Esperanto pri la dana kulturo, pri la dana literaturo, pri la agrikulturo, pri

Danlando kiel turistlando kaj kaj kaj... Antaŭ kelkaj semajnoj mi skribis en „Fraktiko“ kaj „Heroldo“ pri dana fraŭlino, kiu lernis Esperanton en tri tagoj. Preskaŭ 100 samlingvanoj skribis al la fraŭlino. Mullegan dankon pro la valora helpo. Nun ne sufiĉas 100 leteroj, nun devos alveni minimume 2000 skribaĵoj. Bonvolu skribi amase! Kaj baldaŭ Esperanto-prelegoj en la dana radio, en la radio de la „Paradizo De La Nordo“, feliĉigos vin.

Skribu al la gazeto — P o l i t i k e n —, Kopenhago, D A N L A N D O.

A. Weide,
Ce-instruisto,
Hurup, Danlando.

POLLANDA KRONIKO

BYDGOSZCZ. Studenta Esperanto-Rondo en Klasika gimnazio aranĝis solenan Zamenhof-vesperon, kiun pleniĝis prelegoj kaj muzika parto sub gvido de prof. Karaŝkiewicz La rondo ĝuas fervoran subtenon de prof. Sygnarski kaj de la profesoro kun direktoro Polakowski ĉefloke.

ŁÓDŹ. Pola Esperanto Asocio, filio en Łódź, aranĝis 14-an de decembro de 1935 j. lumbilde ilustritan pollingvan prelegon pri vojaĝo al Roma Kongreso kaj Tripoliso, por lernantinoj de ŝtata gimnazio kaj siaj membroj. La 5-an kaj 6-an de januaro de k. j. estis aranĝita malgranda esperanta ekspozicio. Nun kome ĉiĝis kurso gvidata de inĝ. M. Chmieliński, kiun partoprenas pli ol dek skollinoj kaj kelkaj pli aĝaj personoj. Ĉiulandaj gaskoltoj estas pelataj skribi al la kursaninoj laŭ adreso: Łódź. Pola Esperanto Asocio, al. Kościuski 73 — por kurso, por pravi, ke esperanto estas uzata inter eksterlanda skoltaro, ĉar novaj adeptinoj tre interesiĝas pri kontakto pere de esperanto kun tulumonda gaskoltaro, — kaj plivolentigi ilin al lernado de esperanto.

SUWAŁKI. Fondiĝis Esperanta ista Rondo ĉe Z. T. G. S. „Makkabi“. Kurson de 46 personoj gvidas s-ro N. Minc.

TARNOBREG. Okaze de la brofesto la 15-an de decembro ĉi tiea grupo esperantista aranĝis ekspozicion de esperanta libro kaj korespondado en montrfenestro de plej granda ĉi tiea librejo. dank' al afabla permeso de ĝia posedanto s-ro Ka-

zimierz Szpilka, kiu oferis por la ekspozicio tutan fenestron. La ekspozicio daŭris de 12-ĝis 17 decembro de p. j., vekante grandan intereson. Dum la ekspozicio oni disvendadis flugfoliojn kun presita gramatika regularo, eldonitan tiukaze de la grupo. — 13. januaron de k. j. okazis ĝenerala organiza kunveno de ĉi tiea Filio de Pola Esperanta Asocio. Oni elektis jenan estraron: s-ano Biedroński Tadeusz — prezidanto, s-ino Jadwiga Burzyńska — sekretariino, s-ano Antonczyk Stanisław — kasisto. — 15. januaron komenciĝis esperanta kurso en P. E. A. por 14 ĝelernantoj. — 18. januaron — dank' al klopodo de ĉi tiea skollestro s-ro prof. J. Płonka kaj permeso de gimnazia direktoro s-ro R. Janicki, s-ro J. Toczyski komencis kurson esperantan por skoltoj. Enskribiĝis 45 personoj. La kurso estas senpaga.

WARZAWA. La 15. XII. okazis en „Konkordo“ — en kunago kun ĉiuj ceteraj Varsoviaj E-societoj — la tradicie de multaj jaroj aranĝata soleno de l' festo de Esperanto. Cestis 50 personoj. Nur pro la epidemie reganta nun en Varsovio kataro, angino ktp, ne venis multaj.

Malfermis la vesperon en la nomo de l' estraro de „Konkordo“ s-ro E. Wiesenfeld, kiu en mallongaj vortoj memoriĝis la iaman vigan agadon de „Konkordo“ kaj ĝian vekigon kun la espero disvolvi estonte agadon ne malpli (se ne pli) vivan ol iam. Li akcentis, ke tiujn vesperojn tradicie prezidis la patro de „Konkordo“, d-ro Leono Zamenhof... Be-

daurinde li nun ne plu povas tiun taskon plenumi. Ni honoru lian memoron per levigo. (La ĉestantaro eks'aras). Nun vespere — daŭrigis s-ro W. — mi estas la esprimilo de l' deziro de ĉiuj ĉeestantaj, se mi kuraĝos peti, ke d-ro Adam Zamenhof bonvolu okupi la prezidantlokon por la hodiaŭa vespero. — La paroleton mi finu per peto refoje eks'ari por honoru la nomojn de l' intertempe mortintaj konkordanoj: s-ro Feliks Zamenhof, s-ino Hermelin kaj s-ro Bronŝtein. S-ro d-ro Adamo Zamenhof transprenas la prezidanton kaj dankas por la honoro. Li ĉeokaze rakontas pri filozofieco, kiun subŝovis al li malgranda fakto. Kiam li ĉi-jare veturis al Romo, li demandis la konduktoron en vagono, je kioma horo la vagonaro alvenos Romon. — Mi ne scias — respondis la konduktoro. — Mi ne veturigis vin ja ĝis Romo. Mi — nur ĝis la limo veturos kun vi, kaj tie mi cedos la vagonaron al alia. Kaj jen tiuj ĉi vortaj igis lin iam filozofiema: same ja estas kun nia vivo. La Esp-a vivado iras longe, veturos malproksime, antaŭen. Ĝi estas longedaura, senmorta; nur la Esperantistoj estas mortemaj, kaj ne ĉiuj, kiuj gvidas, kunveturos ĝis la celo. Nur ĝis la limo (de sia vivo) kaj tie ili cedos la movadon al alia..

EKSPERIMENTA LETERA KONGRESO.

Al ĉiu Samideano (aŭ Grupo):

Se vi ne havas la rimedon ĉeesti la jaran mondkongreson, eble, kiel multaj aliaj, vi ŝatus sendi komunikon, kiu levigis ĉe iu kunsido. Tamen, ĝisnun komunikoj ne estas sur la programo (aparte de „Salutoj“). Sed, se la nuna eksperimenta kongreso havus valoran rezulton, kredeble la oficiala Mondkongreso metus „Komunikojn“ sur sian programon estonte. Do, vi estas invitata partopreni en „Letera Kongreso“, jene:

1. Sendu komunikon al la suba adreso, baldaŭ aŭ almenaŭ antaŭ julio, 1936.
2. Via komunikado koncernu la lingvan aferon, ekz.: lernmetodon; grupkondukadon, propagandon, respondon al la skeptika demando pri la progreso de la lingvo; aŭ, ĝi estu ideala prelego pri internacia lingvo; ktp, ktp.
3. Kotizo: renio deviga; sed laŭvola donaco por helpi al la negrandaj elspezoj, kaj ebligi premiojn por la plej ŝatindaj komunikoj, danke riceviĝus.

ADRESO: Esperanto-Info, 50 Congress St., Boston, U. S. A.

Bostona Esperanta Societo.
Geo. W. Lee, Prez.,

LA PLEJ GRAVA AFERO NUNTEMPE.

Polskie Radio, ĝia Oficejo de Studoj, entreprenis enkeli la aŭskultantaron, por ekscii pri ĝiaj preferoj, postuloj kaj petoj koncerne la programojn. Tiucele oni eldonis ampleksan demandaron, kiu estas senpage dissendata. Graslitere oni presigis tie la frazon, ke ju pli multaj aŭskultantoj bonvole respondi la enketon, des pli granda estos influo de la publiko sur la radioprogramon.

Samideanoj, jen delonge atendata momento! Utiligu ĝin! Se vi jam ricevis la demandaron, plenu konvene la rubrikojn: „Lekcje języków“ (lecionoj de lingvoj) kaj „Uwagi“, kie postulu: 1) Esp. kursojn en radio, 2) pliofrigon de E.-prelegoj, 3) enkondukon de E.-anoncado, speciale ĉe muzikprogramoj, 4) Esp. kantkoncertojn, 5) Esp. leterkeston, 6) pli fruajn sendohorojn, 7) fiksjajn sendohorojn (ĉiusemajne, en la sama tago de semajno je la sama horo), 8) de tempo al tempo krom la prelegoj — distran programon, 9) Esp. radian vivan gazeton.

Samideanoj, eluzu la okazon, se vi la demandaron ankoraŭ ne ricevis, postulu ĝin poŝtkarte de „Polskie Radio, Warszawa, Mazowiecka 5“, kiu sendos ĝin senpage, aŭ en lokaj radiodissendejoj. Instigu viajn konatojn, ke ili plenu la demandaron laŭ niaj deziroj. La supre cititaj 9 punktoj formuliĝu kaj ordigu laŭvole, aldonu novaĵoj aŭ ion forlasu, por ke ne ne estu rimarkeble, ke la agado estas inspirita de ni. Nepre ni plenumu nian devon, sed tuj.

INTERESA KONKURSO.


Itala Ministerio de Gazetaro kaj Propagando malfermis tre interesan konkurson kun tre valoraj premioj. Oni devas verki plej belan kaj radiofonian artikolon pri Italujo. Inter 6 eblaj lingvoj estas Esperanto. Amplekso de la artikolo 100 linioj. Laboritaĵoj estas akceptataj ĝis 29 II. Skribu tuj por detala informaro al: Direzione Generale per il Turismo — Via Vittorio Veneto 56 — Roma. La premioj konsistas el senpagaj fervojaj biletoj tra Italujo.

UWAGI!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN WIEN 1936

8-15. 18. Aŭgusto.



XII-A SOMERA UNIVERSITATO
 KULTURAJ KAJ EKONOMIAJ PROBLEMOJ DE MEZ-ORIENTO
INTERN KONFERENCO DE VIRINOJ
VOJAĜO TRA AŬSTRIO
 SALZBURG - WIEN - SEMMERING - GROSSGLOCKNER - SALZBURG
 CARINTH URBOJ - NECKROVITAJ MONTOJ - BLAU ALPJOJ - BARIUBO
FESTARANĜOJ
 KOSTUMBALO: LA KONGRESO BANCAS
 OPERETO: LA BLANKA ĈEVALETO
 KONGRESOJ: LA FESTARANĜOJ DE IMPERESTRA, KASTELO HOFBURG
 MADRIDO, ESPERANTO-KONGRESO, WIEN-INDUJ BURG.

28 UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO,

Wien 8—15. de aŭgusto 1936.

Komuniko Nr. 2.

Ni sciigas, ke la karavano al la XXVIII-a Univ. Kongreso en Wien organizas P. E. D. (Kraków, Lubicz 34). Detalojn legu en januara numero de „Pola Esper.“. Pluajn ni donos en marta numero. Ĉe demandoj aldonu nepre pmarkon por respondo.

Ludwik Kutschak

Ekzekutiva-ano de P.E.D.

Kiu deziras interŝanĝi egalkvante poŝtmarkojn de sia lando kontraŭ polaj, sendu ilin al s-ano Jerzy Mostowski p. a. „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. Polujo.

20 — 50%

malaltigis la prezojn de siaj eldonaĵoj ekde 1 januaro ĉijara

LITERATURA MONDO

pro nova valutopolitiko de la Hungara Nacia Banko kaj per tio ankaŭ la prezoj

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicę: 5 fr. szw Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: male ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZERAZ ROZDRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29.

KONTO P. K. O. NR. 408 600.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

de ĝiaj neserie aĉelataj libroj apartenas al la plej malaltaj en nia literaturo. Jen kelkaj ekzemploj:

Julio Baghy: Viktimoj svfr. 2.50 anstataŭ svfr. 5.—

Enciklopedio de Esperanto I—II broŝurita, ilustrita svfr. 18.— anstataŭ svfr. 30.—
 Plena Gramatiko de Esperanto svfr. 6.— anstataŭ 8.—

Tiuj nunaj prezoj senvalidigas ĝenerale ĉiujn favorajn prezojn, konstatitojn ĝis nun por kurzsuferantaj landoj. Tamen, se tiuj antaŭaj prezoj estis ie pli malaltaj, ili ne estas plialtigataj.

Por ne kaŭzi ĉagrenon, ni repagas al ĉiu mendinto, kiu faris sian mendon el niaj libroj post 1 januaro la diferencon inter la malnova kaj nova prezoj. Bonvolu skribi pri tio al via mendloko.

Detalan liston pri la malaligo sendas al vi volonte la eldonejo Literatura Mondo, Hungarujo, Budapeŝt IX. Mester-u. 53. kaj ĉiuj libristoj.

VII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO

okazos la 31. V. — 1. VI. 1936 en Kraków. La programo estas jena:

Sabato 30. V. Akceptado de alveturintoj en la stacidomo.

21h Interkonatiga vespero.

Dimanĉo 31. V. 9h diservo.

11h inaŭguro de la kongreso kaj konferenco de P. E. D.

13h komuna tagmanĝo.

14h laborkunsido.

20h gaja vespero.

Lundo 1. VI. 7.30h veturo al Sowin'ec.

11h laborkunsido.

13h komuna tagmanĝo.

15h laborkunsido.

18h fermo de la kongreso.

Pluaj sciigoj en marta numero de „Pola Esper.“

Pollanda Esperanto-Delegataro.
 Zawiadamiamy, iż „Ondo de Daŭgava“ nie będzie wydawane w roku bieżącym.

ABONO: jare zł. 8.—, duojare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—